

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

PRI LA LITERATURA KOMITATO F.L.E.

Esperanto estas lingvo facile lernebla, sed nur relative, nome kompare kun lingvoj naciaj. Ne funde studinte Esperanton, oni povas — same kiel en la gepatra lingvo — fari erarojn. Kaj tiujn erarojn oni faras des pli facile, ju pli facila oni konsideras la lingvon. Krome, nacilingvaj kutimoj povas grave ĝeni la aŭtoron aŭ tradukanton kaj fari lian produkton parte nekomprenebla al alilandanoj.

Bona afero meritas esti bone studata; suprajemo kaj facilanimeco estas ĝiaj plej gravaj malamikoj, kiuj ankaŭ Esperanton faris viktimo, kiel evidentiĝas el diversaj malbonaj fruktoj sur ĝia literatura kampo. Interese estas, ke la inklino por verki aŭ traduki ŝajnas pli granda ĉe nekompetentuloj ol ĉe spertuloj. La lastaj, pli konsciaj pri la malfacilaĵoj, kiujn verkado kaj tradukado prezentas, ofte hezitas entrepreni laboron, pri kiu ili timas, ke ĝi superas ilian kapablon. La nekompetentulo en sia entuziasmo kaj erara opinio pri la facileco de la lingvo ofte ne konas tiujn konsciencajn skrupulojn kaj ĵetas sin sur originalan verkadon, tradukadon aŭ poemfaradon kun sinkonscio enviinda. Se li sukcesas presigi siajn produktojn, aperas sur la merkato literaturajoj, kies lingva nivelo ne povas toleri eĉ plej indulge kritikan okulon, kaj la aĉetinto sentas sin trompita. Pri la verko mem oni devas bedaŭri, ke ĝi ne ricevis pli indan veston.

Ĉi tiuj konsideroj jam antaŭ longe naskis deziron, ke la literaturo estu kontrolata de spertaj esperantistoj. Komence d-ro Zamenhof mem faris tiun laboron, sed okaze de la Sepa Universala Kongreso en 1911a oni fondis „Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Verkistoj“, poste nomitan „Esperantista Literatura Asocio“, kies anoj reciproke kontrolis siajn manuskriptojn. Ĝi faris utilan laboron; sed post la unua mondmilito ĝi ne estis plu tiom aktiva kaj fine tute mortis.

Ankaŭ la Esperantista Akademio sin okupis pri kontrolado de literaturaj verkoj. Sed, kiel prof. Boucon, kiu preskaŭ tute sola faris tiun laboron, deklaris, ĝi faris multe da vana laboro, kontrolante manuskriptojn, kiuj poste ne estis presataj, kaj librojn, kiuj neniam atingis duan eldonon, en kiu la faritaj rimarkoj povus esti utiligataj. Krome ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas la persona kontrolo, kiun la verkinto petas al amiko aŭ konato.

Sekve de malfavora kritiko pri diversaj lastatempaj eldonaĵoj la 22a Kongreso de F.L.E. en 1937a fondis komitaton, kies celo estas bari la vojon kontraŭ plua fuŝado de la lingvo, kontrolante la verkojn antaŭ ilia apero. Ĝia nomo estas „Literatura Komitato F.L.E.”

Kvankam fondita de F.L.E., la komitato estas neŭtrala koncerne sian konsiston kaj kontrolan laboron: ĝi rajtas inviti ankaŭ esperantistojn el aliaj organizoj kaj aliaj landoj partopreni ĝian laboron, kaj ne limigas sin per la kontrolado de eldonaĵoj de F.L.E.

Kiel anojn de la komitato la Kongreso elektis Th. Buis, G. J. Degenkamp, F. Faulhaber kaj B. J. Makkinje. Ĝi sendis al la Esperanta gazetaro tri cirkulerojn, en kiuj ĝi klarigis sian celon kaj alvokis al kunlaboro. Rezulte de tiu alvoko aliĝis al la komitato Helmi Dresen en Estonio, kiu montriĝis vera gajno. Pro tragika okazintaĵo dum la milito ŝi bedaŭrinde perdiĝis por nia afero. Mortis en tiu tempo ankaŭ B. J. Makkinje.

Por ankaŭ praktike montri sian celon la komitato baldaŭ ricevis bonan okazon ĉe la apero de la du romanseroj de F.L.E. La verkoj el tiuj serioj akiris en la esperantistaro bonan famon, vekantan fidon pri la laboro de la komitato. Pro tio ĝi ricevis post la milito ankaŭ de ekster la kadro de F.L.E. petojn pri kontrolado. Diversaj verkoj al Danio kaj Portugalio estas kontrolitaj kaj -ataj, kaj petoj pri informoj pri ĝia laboro instigis nin verki ĉi tiun artikolon.

La „Literatura Komitato F.L.E.” konsistas nun el la jenaj anoj: L. Friis (danlingvano), M. Dessoit (franclingvano), E. Faulhaber-Ĉiškowska (ĉeĥlingvano), G. J. Degenkamp, F. Faulhaber, A. Kloek, W. F. Kruit kaj J. van Scheepen (nederland-lingvanoj).

Pri la labormaniero de la komitato la jeno: Dependas de lingvo kaj stilo de la manuskripto, ĉu la komitato akceptas peton por kontrolo: ĝi ne estas institucio por instruado, nek por korektado de tradukaj ekzercoj! Manuskriptojn evidente verkitajn de nekompetentuloj ĝi do rifuzas.

Por eviti vanan laboron ĝi kondiĉas krome, ke eldonisto deklaru sin preta eldoni la verkon.

Ordinare du komitatanoj okupas sin pri la manuskripto; unu el ili apartenu al alia nacia lingvo ol la aŭtoro. Tria ano komparas la faritajn rimarkojn kaj kun la aŭtoro korespondas pri ili. Ĉe tio la komitato neniel deziras tuŝi ties liberon pri persona prefero koncerne formojn, pri kiuj ne ekzistas universala opinio — kondiĉe, ke ili ne estu kontraŭfundamentaj. La ĝisnuna sperto pruvis ĉi tiun labormanieron kontentiga por ambaŭ partioj.

La tasko de la „Literatura Komitato F.L.E.” havas signifon por la tuta esperantistaro. Pro tio la komitato bezonas ĝian subtenon. Tial mi alvokas kompetentajn esperantistojn, precipe eksterlandajn, helpi ĝin en ĝia kontrola laboro, tiel kontribuante al plialtigo de la lingva nivelo de nia literaturo!

F.F.

Dem.: Ĉu la vorto „futbalo” por *voetbal* estas rekomendinda?

Resp.: Kvankam kelkaj aŭtoroj uzas „futbalo” anst. „piedpilko”, supozeble pro simileco kun la angla *foot-ball*, tiu vorto saĝnas al ni nepre malkonsilinda neologismo. Oni ne tro facilanime enkonduku pure naciajn vortojn, se la esprimota ideo jam havas bonan Esperantan nomon. Ni memoras, ke oni iam klopodis enkonduki „brodkasto” por „radio”, feliĉe sen sukceso.

POR KOMENCANTOJ

H. Kujt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 12. Vertaal in Esperanto:

DE SAMENGESTELDE TIJDEN.

Morgen om 10 uur zal iedereen aan het werk zijn. A.s. Zaterdag zullen wij naar Parijs vertrekken. Als wij daar aangekomen zijn, hebben wij 300 km. gereisd. Toen de dokter de kamer binnenkwam, was de man reeds overleden. De trein staat klaar voor het vertrek. De boeken, die ik voor de kinderen heb gekocht, hebben zij nu reeds gelezen. „Stil Jan”, zei vader, „praat niet als wij aan 't eten zijn.” Toen ik de zaal binnenkwam, was de vergadering reeds begonnen. Kom morgen om 7 uur, dan hebben wij gegeten. De trein zou al aangekomen zijn, als het ongeluk niet was gebeurd.

Vertaling van opgave 10.

La instruisto pardonis al la knabo¹⁾ lian malbonan²⁾ konduton. Tridek jarojn³⁾ li pasigis⁴⁾ en la polusaj⁵⁾ regionoj. La maljuna virino tre amis⁶⁾ sian⁷⁾ hundon, la malgranda blankan pudelon⁸⁾. Jam kvar fojojn⁹⁾ mi petis lian kunlaboron. Johano pli amas sian fraton ol sian fratino¹⁰⁾. La libroŝranko¹¹⁾, kiun mi ricevis de la patro, estas du metrojn alta. La virino amas neniun krom sian edzon¹²⁾. La¹³⁾ pasintan jaron ni pasigis⁴⁾ dek tagojn en la ĉirkaŭaĵo de Arnhem. La bubo jetis la pilkon¹⁴⁾ en la ĉambro¹⁵⁾ kaj trafis la maljunan viron.

1. Niet: ...*pardonis la knabon lian malbonan konduton; pardoni, skribi, peti iun* mag men zeggen inplaats van *al iu*, indien er geen andere rechtstreekse bepaling in de zin voorkomt, deze *n* mag dan het voorzetsel *al* vervangen. Niet aan te bevelen is: ...*pardoni la knabon pro lia malbona konduto*. 2. Ook: *maldecan*. 3. Niet: zonder *n*; dit is een rechtstreekse bepaling. 4. Niet: *pasis, estis pasinta; pasi* is een onovergankelijk werkwoord, bijv.: *la tempo agrable pasis*, maar: *mi pasigis la tempon agrable*. 5. Niet: *polaj; polo* behoort tot het Poolse volk. 6. Ook: *ŝatis*. 7. Niet: *sian*; de hond is bezit van het onderwerp, met *sian* zou de hond van een andere vrouw worden bedoeld. 8. Niet: zonder *n*; dit is een bijstelling d.i. een aanvulling van een zinsdeel en komt in dezelfde naamval te staan. 9. Ook: *kvarfoje*. Niet: *kvar foje*. 10. Niet: zonder *n*; vergelijk: *Johano pli amas sian fraton ol lia fratino* (amas la fraton). 11. Niet: *la libroŝrankon*; dit is het onderwerp van de zin: *la libroŝranko, ... , estas du metrojn alta*. 12. Niet aan te bevelen is: *krom sia edzo*; vergelijk: *la virino amas neniun krom sia edzo* (amas neniun); hoewel gewoonlijk na een voorzetsel geen vierde naamval volgt, kan het hier aanleiding geven tot misverstand; *krom* doet dan dienst als voegwoord; dit kan ook voorkomen bij *anstataŭ*. 13. Niet zonder *la*; vergelijk: *pasintan jaron* = een vorig jaar, *la pasintan jaron* = het vorige jaar (het laatste). 14. Niet: *balon; balo* = bal, danspartij. 15. Niet zonder richtings *n*.

Dem.: Kiu prepozicio estas la pli ĝusta en esprimoj kiaj „plena je (de, da) nuboj; riĉa je (de, da) fruktoj”?

Resp.: Por tiaj esprimoj ne ekzistas speciale taŭga prepozicio, pro kio oni ofte uzas „je”. Zamenhof mem tamen ofte uzis „de” post „plena”, eble por tio, ke „plena de” signifas multfoje „plenigita de” aŭ „plenigita per”. Pro la kvanta signifo de „plena” kaj „riĉa” kelkaj uzas ankaŭ „da”, kio ŝajnas al ni nerekomendinda, ĉar „da” cetere ne estas uzata post adjektivoj, Prefere oni uzu „je” aŭ „de”.

Dem.: En „Fund. Krest.”, pĝ. 24a troviĝas la frazo „Unu fojon Aleksandro volis iri Afrikon, kie troviĝas la oro kaj kie regas virinoj, kiuj ankaŭ batalas kun siaj malamikoj.” Ĉu ne estas pli korekte anstataŭigi „unu fojon” per „iam”, kaj „kun” per „kontraŭ”?

Resp.: Vi pravas. „Unu fojon” = één keer; „iam” = eens, op zekere keer. Kaj post „batali” oni uzu prefere „kontraŭ”, ĉar oni ja povas batali kun sampartianoj kontraŭ komuna malamiko.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 12. Vertaal in Esperanto:

1. Welke krant leest gij? Abonneer u op ons maandblad! 2. Ik lees in de krant, dat men in de omgeving van uw woonplaats enige everzwijnen had gezien. 3. Om zichzelf te redden verried hij zijn vrienden. Zulk een handelwijze is laag. 4. Uit de opeenvolgende aardlagen vormen de geologen zich een denkbeeld omtrent de geschiedenis van onze aardbol. 5 Die volksstam woont in lage hutten, waaraan vensters en schoorstenen ontbreken. 6. Al te veel mensen vullen hun leven met laag-bij-de-grondse vermaken. 7. In de herfst worden bijna alle bomen kaal. Voor ons strekte zich een kale vlakte uit. 8. In antwoord op uw brief van 23 dezer, hebben wij de eer u te berichten, dat wij uw voorstel aanvaardden. 9. Holle vaten klinken het meest, dat betekent, dat zij, die het minst weten, vaak het meeste lawaai maken. 10. Hoe meer men weet, des te meer ondervindt men, dat men bijna niets weet. 11 Eén dwaas kan meer vragen, dan tien wijzen kunnen beantwoorden. 12. Vogels kunnen vliegen; doch niet alle dieren, die kunnen vliegen zijn vogels. 13. Weet, wat gij zegt, doch zeg niet altijd, wat gij weet; denk aan (atenti) het spreekwoord: Spreken is zilver en zwijgen is goud. 14. Aan deze muur hangen reeds een klok en twee schilderijen; hang de spiegel aan de andere muur. 15 Stel niet uit tot morgen, wat gij heden kunt doen.

Vertaling van opgave 11.

1. Estas jam malfrue, ni finu, morgaŭ ni daŭrigos la laboron. 2. Kiam nia laboro (tasko) estis finiĝinta (Post kiam finiĝis nia laboro), ni iris hejmen kaj pasigis la vesperon en familia rondo. 3. Amiko mia, vi tute pravas (vi havas ĝustan opinion), sen Esperanto intima kontakto kun eksterlandanoj estas neekzistipova. 4. La paketo malligiĝis; kiu el vi povas helpi min per peco da ŝnuro? 5. La korpon oni povas mortigi, ne la spiriton; ĉi tiu daŭrigas la vivadon spite al (de) ĉia persekutado (postvivas ĉian persekutadon). 6. En iuj jarcentoj vivis geniuloj (talentuloj), kies laborado kaj pensado formas la bazon de nia nuna civilizeco. 7. Kio ajn okazos, klopoĉu (penu) ĉiam konservi vian spiritĉeeston. 8. Ni vizitis la urbodomon, la muzeon, kelkajn preĝejojn kaj la zoologian ĝardenon. 9. La papo estas la estro de la Rom-Katolika Eklezio. 10. Per tiu ĉi ni sciigas (komunikas) al vi, ke ni en bonordo (bonorde) ricevis la de vi senditajn varojn (komercaĵojn). 11. La kongreso estis akceptata de la komunumestro en la urbodomo. 12. Ĉi tiu sumo estu pagata en tri tagoj (antaŭ forpaso de tri tagoj) en la oficejo de la impostkolektisto.

Dem.: Kiel traduki: 1. Ik weet alles van die zaak (af). 2. Ik weet niet van die zaak (af). 3. Ik weet weinig van die zaak (af). 4. Ik weet zeer weinig van die zaak (af).

Resp.: Laŭvole oni povas traduki: 1. Mi scias ĉiom pri tiu afero, k.s.; sed por eviti sinsekvon de siblaj sonoj ni preferus: 1. Mi estas tute (plene) informita pri tiu afero. 2. Mi scias neniom. . . . 3. Mi scias malmulte. . . . 4. Mi scias tre malmulte pri tiu afero. La adverbo „af” ne bezonas tradukon; ĝi estas same pleonasma, do superflua kiel „toe” en „naar de stad toe”.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 17. Vertaal in Esperanto:

SPAARBANKBOEKJES.

Hoeveel mensen hebben er in Nederland een spaarbankboekje? Meer dan u misschien denkt. Op 31 December 1938 waren er 3.7 miljoen boekjes in omloop bij de verschillende spaarbanken, dat wil dus zeggen dat bijna 1 op de 2 Nederlanders een appeltje voor de dorst had. Daarvan waren er 2.4 miljoen of ongeveer 2/3 bij de Rijkspostspaarbank en 1/3 bij de bijzondere spaarbanken. Nu zult u zeggen dat er veel boekjes zijn waar al sinds jaar en dag vrijwel niets meer op staat. Dat valt nogal mee. Gemiddeld stond er op een boekje van de Rijkspostspaarbank f 287.—; op een boekje van de andere spaarbanken f 405.—. Daar zal natuurlijk in de dagen toen men zijn geld zoveel mogelijk in goederen omzette wel wat zijn afgegaan. Maar ook dat wordt wel weer ingehaald. Het is een verheugend ding, dat zovelen zich enige beperking willen opleggen in dagen van betrekkelijke voorspoed om bij tegenslag niet direct afhankelijk van anderen te zijn.

(Stat. Zakboek 1940).

Opgave 18. Vertaal in het Nederlands:

1. Okulo de mastro pli ol beno de pastro. 2. Mono plenumas ĉiujn oficojn. 3. Komenco aprila — trompo facila. 4. Aprila vetero — trompa aero. 5. Lernu juna — vi scios maljuna. 6. Post sufero venas prospero.

Vertaling van opgave 15.

Dumas iam¹⁾ ĉeestis tre oficialan tagmanĝon²⁾. Post finiĝo³⁾ de la manĝo⁴⁾ konato⁵⁾ demandis lin⁶⁾, ĉu⁷⁾ li bonŝancis⁸⁾ koncerne siajn tablonajbarojn⁹⁾.

„Silentu¹⁰⁾, viro¹¹⁾”, kolere¹²⁾ respondis Dumas. „Se mi mem ne estus ĉeestinta, mi estus enuinta ĝismorte.”

Ĉu vi scias¹³⁾, ke¹⁴⁾ ĝuste en tempo de streĉado kaj timo¹⁵⁾ estas tre¹⁶⁾ grave¹⁷⁾, ke oni bone spiradas?¹⁸⁾

Per bona kaj profunda enspirado tra la nazo kaj per elspirado tra la buŝo pli boniĝas la pulso¹⁹⁾ kaj forflugos en la aeran senfinajon multe da malkvieto, timo kaj ekscito, kiuj kaŭzas obsedon²⁰⁾ pro kiu ni povas senti nin tiom malsanaj kaj malfeliĉaj.

(Huishouding van Nu).

1. Niet: *foje* (eenmaal). 2. Niet: *vespermanĝon*. „Diner” is middagmaal. 3. „Fini” is overgankelijk. Met „iĝ” wordt het onovergankelijk gemaakt. Dit achtervoegsel blijft dus in het zelfst. naamw. behouden. 4. Het is niet nodig „tagmanĝo” te gebruiken. 5. Niet: *konatulo*, daar zowel „ato” als „ulo” een persoon aanduiden. 6. Ook: *al li*. 7. Niet: *aŭ*. „Ĉu” duidt op een twijfel, niet weten. 8. Ook: *bone trafis* of *favore lokiĝis*. 9. *Najbarajn ĉeestantojn* is niet heel duidelijk. Ook: *kunmanĝantojn* of *ĉetablajn najbarojn*. 10. Ook: *haltu*, *ĉesu*, *ne parolu pri tio*. 11. Ook: *homo*. 12. Ook: *malice*, *furioze*. Als bepaling van gesteldheid kan eveneens, doch dan eindigend op „a”. 13. De vraag moet eigenlijk luiden: weet u? 14. „Het” wordt niet vertaald. 15. Ook: *angoro*, wat veel sterker is. 16. De betekenis is niet direct/een vergelijking (*tiom*, *kiom*), maar zij geeft een graad aan. 17. Z.g. onpersoonlijke uitdrukking. 18. Niet: *spiru*, doch aantoonende wijs. 19. Ook: *korbatu*. 20. Ook: *korpremon*. Niet: *streĉadon*.

Dem.: En „La Interligilo” oni uzas kelkfoje kiel tradukon por „gestroomlijnd” la vorton „aerodynamikforma”; ĉu ĝi ne estas pli ĝusta ol „flulinia”?

Resp.: Oni povas eble argumenti, ke „aerodynamikforma” estas laŭsignife pli bona ol „flulinia”, sed praktike ĝi estas neuzinda; unue, ĝenas ĝia longeco; due, ideon pri eleganteco de linioj oni esprimu ne per vorto peza, eĉ se tiu estas pli logika.

DE WERKWOORDEN

WEDERKERIGE WERKWOORDEN (VERBOJ DE RECIPROKECO).

Een groep werkwoorden die in het Nederlands niet als bijzondere werkwoorden kenbaar zijn, en die ook in Esperanto, naar ons weten, nog niet afzonderlijk zijn besproken, vormen de werkwoorden van wederkerigheid. Toch verdienen deze werkwoorden eerder als afzonderlijke groep behandeld te worden dan de wederkerende, die eigenlijk in geen enkel opzicht van andere werkwoorden te onderscheiden zijn en wier enige kenmerk het wederkerend voornaamwoord is. Daarentegen worden de werkwoorden, die wij wederkerige noemen, gekenmerkt, behalve door toevoeging van een voornaamwoord of bijwoord (*reciproke*), vaak ook door een voor- of achtervoegsel.

„Wederkerig” noemen wij een werking, die door meer dan één onderwerp of door een meervoudig onderwerp verricht wordt ten opzichte van die onderwerpen of dat onderwerp zelf, met dien verstande, dat bijvoorbeeld in een werking door de onderwerpen A en B verricht, A die werking doet ten opzichte van B en B ten opzichte van A. In het Nederlands wordt dit begrip weergegeven door het wederkerig voornaamwoord *elkaar* = elk ander.

Zo'n voornaamwoord kent het Esperanto niet. En nu moeten wij toegeven, dat in dit opzicht onze moedertaal gemakkelijker is dan Esperanto, omdat bij gebreke van dit voornaamwoord Esperanto zich behelpen moet met enkele andere vormen, die, alhoewel zij de juiste betekenissen volkomen logisch kunnen weergeven, toch dit nadeel hebben, dat zij te veel in aantal zijn en, misschien juist daardoor, als regel een inconsequent, ontoereikend of pleonastisch gebruik vinden.

Men moet wel onderscheiden tussen de wederkerige uitdrukkingen, waarin de werking objectief-wederkerig is, d.w.z. het onderwerp logisch voorwerp is van de werking (*ili renkontas sin, renkontas unu alian, interrenkontas*) en die, waarin het onderwerp logisch geen lijdend voorwerp wordt, maar belanghebbend voorwerp of bepaling met voorzetsel (*ili parolas inter si, interparolas, parolas unu kun alia*). Bij de gevallen uit de tweede groep is natuurlijk ook wel een lijdend voorwerp te gebruiken, maar dat voorwerp is dan altijd een andere persoon of zaak dan het onderwerp zelf, bijvoorbeeld: *Ili reciproke priparolis tion. Ili interŝanĝas leterojn. Premi unu al alia la manon.*

De eenvoudigste, zelden voorkomende en eigenlijk ontoereikende vorm van een wederkerige werking is het werkwoord plus wederkerend voornaamwoord: *Justeco kaj paco sin kisas Z. Ili renkontis sin.*

Een andere, o.i. eveneens ontoereikende vorm is het werkwoord plus achtervoegsel *iĝi*: *Bono kaj vero renkontiĝas Z. Oni konsiliĝis.*

Vroeger meer dan thans werd de wederkerigheid uitgedrukt door *inter* als voor- en *iĝi* als achtervoegsel. O. i. is die vorm overdadig, omdat elk onderwerp van bijvoorbeeld *interrenkontiĝi renkontas* en *estas renkontata* (dit laatste juist dan *renkontiĝas*), zodat men gemakkelijk met *interrenkonti* kan volstaan. Enkele voorbeelden van *inter—iĝi* zijn *interrenkontiĝi, interkonsiliĝi, interkompreniĝi, interkonatiĝi, interkomunikiĝi, interkruciĝi, interplektiĝi, interkonsentiĝi, intervidiĝi*.

De uitgang *iĝi* is niet te gebruiken als het onderwerp geen voorwerp wordt, maar zich op een andere wijze tot zichzelf verhoudt. Men gebruikt dan wel *inter*: *interparoli, intertrakti, interkorespondi, interkonsenti, interkomuniki*. Dit is zeker een van de meest eenvoudige vormen en alleen daarom al aan te bevelen. Ook als het onderwerp wel logisch voorwerp is, is deze vorm te verkiezen boven het lange en lelijke *inter—iĝi*, dus: *interrenkonti, interkonsili, interkompreni, interekkoni, intervidi*. Zo lijkt ons ook *interlabori* voor *samenwerken* (niet: *meewerken*) een geschikt woord. Alleen bij woorden als *interkruciĝi, interplektiĝi* e.d. kan *iĝi* behouden blijven, omdat de respectieve onderwerpen daarin niet *krucas* en *plektas*, maar *kruciĝas* en *plektiĝas*.

Een even eenvoudige vorm is het werkwoord plus *inter si*: *Vivi inter si harmonie Z. La judoj edziĝas inter si. Kvereli inter si.*

Inter si komt ook voor na het werkwoord met *iĝi*: *Ili konsiliĝas inter si Z.*

De wederkerigheid komt voldoende tot uitdrukking in *reciproke*: *Reciproke batalantaj nacioj Z. Reciproke paroli.*

Toch bezigt men *reciproke* bijna steeds in verbinding met *sin* of *al si*: *Ciuj sin reciproke komprenas Z. Ili juris al si reciproke Z. Reciproke jeli al si riproĉojn.*

De meest gebruikelijke, alhoewel niet bepaald mooie vorm van wederkerigheid is *unu (la) alian*, waarbij men wel eens *sin* ten overvloede toepast: *Oni ne vidis unu alian Z. Ne trompu unu alian Z. Komprenante unu la alian, la popoloj Z.*

Eist het werkwoord een of ander voorzetsel, dan brengt dit de beginner vaak in verlegenheid. Men vertaalt dan bijvoorbeeld wel eens: *La viroj staris apud unu alia*, wat natuurlijk behoort te zijn: *La viroj staris unu apud alia*. Ons elkaar kan wel vertaald worden met *unu alian*, maar men houde in het oog, dat *unu alian* betekent *de een de ander*. Is dus een voorzetsel nodig, dan komt dit tussen beide woorden in en niet er voor: *de een bij de ander = unu apud alia*.

Een zekere beperking in de wederkerigheid vindt men bij het gebruik van de voorzetsels *sur*, *super*, *sub*, *ekster*, *ĉirkaŭ* en *en*. Immers, staan twee personen naast elkaar, dan kan men zeggen, dat A staat naast B en B naast A; maar liggen twee boeken op elkaar, dan ligt het ene boek wel op het andere, maar dit niet op, doch onder het eerste.

Dezelfde beperking geldt voor *antaŭ* en *post*, terwijl bij gebruik van laatst genoemd voorzetsel de rangorde van *unu* (de een, eerste) en *alia* (de ander, tweede) logisch een rol behoorde te spelen. De logische vorm *post unu alia* komt echter slechts zelden voor.

Het hierboven besprokene nog eens in het kort samenvattende, krijgen we de volgende vormen:

Objectief wederkerige werkingen:

renkonti sin
renkontiĝi
interrenkontiĝi
interrenkonti
renkontiĝi inter si
reciproke renkonti
reciproke renkonti sin
renkonti unu alian

Wederkerige werkingen zonder lijdend voorwerp:

paroli inter si

interparoli

reciproke paroli
reciproke paroli inter (al) si
paroli unu kun (al) alia

Het gebruik van *inter* als voorvoegsel behoeft nog enkele toelichtingen:

Logisch moet een wederkerige werking door meer dan één onderwerp of door een meervoudig onderwerp geschieden, omdat elke persoon van het onderwerp de werking verricht ten opzichte van de andere persoon (personen) daarvan, bijv.: *A kaj B interkonsilas* of: *Ili interkonsilas*, maar niet: *Li interkonsilas*. Toch lijkt ons een zin als: *Li interkonsilis kun sia amiko*, niet verkeerd, omdat het voorzetsel *kun* duidelijk genoeg doet uitkomen, dat de werking logisch, behalve door het onderwerp *li*, ook door *sia amiko* wordt uitgeoefend.

En tenslotte nog dit: Men beschouwe niet alle werkwoorden met *inter* als voorvoegsel als werkwoorden van wederkerigheid. *Inter* kan ook betekenen, dat het onderwerp twee of meer voorwerpen met elkander verwisselt of vermengt: *interkontakti*, *intermiksi*, *intermeti*, *interfrapi la manojn*. En *inter* kan ook een plaatsbetekenis hebben: *interrompi = rompi inter io*, *interskribi = skribi inter io*, *interŝovi = ŝovi inter io*.

Dem.: Sub „Tra nia/literaturo” en la vov. n-o, pĝ. 87a troviĝas esprimoj kritikitaj. Kelkajn mi korektis, ekz.: 1. Bataletoj estis batalataj = Bataletoj okazis. 2. Virpantalona paro = Virpantalono. 3. Si komencis june = Si komencis, kiam ŝi estis juna, aŭ: Si komencis juna. 4. Estas bone sciante = Oni bone scias, aŭ: Estas bone konate.

Resp.: Vi korektis ĝuste. Ni nur aldonu: 1. Ankaŭ: Jen kaj okazis bataletoj. La kritikinto en la originala frazo estas ĝia malbelsoneco. 2. Ĉar en kelkaj lingvo „pantalono” havas pluralan tradukon, la tradukinto de „La fera kalkanumo” opiniis necesa la aldonon „paro”, sed malĝuste, ĉar pantalona paro estas ja du pantalonoj, do entute kun kvar tuboj! 3. Ni preferas la mallongan formon; „juna” estu adjektivo, ĉar ŝi komencis estante juna. 4. Pli internacia kaj pli estas la aktiva formo. „Estas sciante, oni estas petata” k.s. estas malbelaj formoj.

Werft onder leden en cursisten nieuwe abonné's op „La Progresanto”!
In onze nieuwe jaargang bijzondere vertaal oefeningen voor beginners!

TRA NIA LITERATURO

LA VANA KANTO.

poemaro de L. Thèvenin. Eldonis: „Kompreni“, 32 Cours Gambetta, Lyon.

En la poemoj la poeto parolas per la koro. Li prezentas al ni siajn animstatajn kaj delikatajn sentojn. Li estas amanto de la naturo, kaj en la poemoj rolas la birdoj, plantoj kaj sezonoj. Tro multe da amkantoj kompletigas la serion. La aŭtoro estas lerta esperantisto, kaj laŭ lingva vidpunkto la makuloj estas nur malmultaj. Rekomendinda libreto.

SES DIVERSAJ KANTOJ KUN MUZIKO.

C. Chalas, 4^e Rue des Talles Claudiennes, Lyon I.

30 fr. aŭ 3 intern. resp.-kuponoj.

Ses kantoj, el kiuj kvin taŭgas por kanti, kiam oni grupe marŝas. La tekstoj estas distraj, sed neniom profundsantaj. Kelkfoje la tradukinto tordis la frazojn por akiri la Esp.-tradukon. Krom tio li pekis kontraŭ la poezia arto kaj faris gramatikajn erarojn.

Uzeblaj en grupoj kunvenoj.

ESPERANTOMARSO.

Jac. Feitsma, de vertaler van de boekjes „Van Vreemde Velden“, componeerde een Esperanto-mars, waarin „La Espero“ van F. de Mènil werd gebruikt als trio. De pianopartij, uitgegeven door Gebr. Nienhuis te Groningen is in een niet te moeilijke zetting gehouden, terwijl het gehele stuk van accoord aanduidingen is voorzien. Van deze vlotte mars zal ook een bewerking voor mandoline-orkest verschiĳnen, terwijl bij gebleken behoefte, die voor blaasorkest zal volgen. Het Vaudeville-orkest bracht deze mars reeds meermalen voor de microfoon ten gehore.

Daar herhaalde uitzending van de Esperanto-mars ook voor ons een propagandistische waarde heeft, wekken wij de esperantisten op er bij de radio-verenigingen op aan te dringen, herhaling van deze uitzendingen te doen plaats vinden.

J. van Scheepen.

Dem.: Kio estas la ĝusta traduko por *gletscher*? Kiel vi opinias pri „montglacirivero“ por *gletscher* kaj „marglacimonto“ por *ijsberg*?

Resp.: Por *gletscher* oni uzas „glaciejo“ kaj „glaciaro“. La lasta ŝajnas al mi pli taŭga. Krome ĝi similas al „akvaro“, trafe uzata anstataŭ la malpli bela „akvego“. Por indiki *gletscher* kiel lokon ankaŭ „glaciejo“ estas uzebla. „Montglacirivero“ estas tro longa kaj peza. Por *ijsberg* sufiĉas ĝenerale „glacimonto“. El la kunteksto montriĝas, ĉu ĝi troviĝas surmare aŭ alialoke.

REDAKCIA KORESPONDO.

Al s-ro d-ro R.P. en M.O.: Vi pravas: vortfarado estas arto, kaj arto ne estas lernebla, se oni ne havas talenton. Sed ĝuste pro tio homoj ne havantaj talenton ne traduku verkojn por publikigo.

Sufiĉe detala lernolibro pri vortfarado ne ekzistas en Esp. P.V. prezentas jam multe da uzindaj parolturnoj, sed estus dezirinde, de ankaŭ la nacialingvaj Esp.-vortaroj enhavu multe da tiaj ekzemploj kun la respektivaj tradukoj. Niaj vortaroj estas bedaŭrinde nur vortlistoj. La sola kaj celtrafa maniero por proprigi al si bonajn parolturnojn estas: stude legante bonajn verkojn, noti ĉiujn rimarkindajn esprimojn kaj imiti ilin. Tion farante oni ne nur kolektas kaj lernas multajn parolturnojn, sed ankaŭ akiras juĝpovon pri tiaj formoj kaj evoluigas sian talenton por mem ilin krei. Laŭ via deziro ni klopodos en postaj skizoj sub „Tra nia literaturo“ aldoni korektojn al kritikitaj esprimoj. Sed ne ĉiam ni sukcesas trovi ilin, ĉar ofte malbona traduko estas nekomprenebla, kaj pro nescio de la originala verko ni ne povas kontroli kia ĝi devas esti.

Al k-do F. de V. en Sch.: Ni klopodos akiri por vi la petitajn terminojn.

Al k-do M.L. en B.: Vi opinias nian respondon pri uzado de *k* anst. *kaj* stranga ĉar pluraj (?) esperantistoj, i.a. Oevi (?), Waringhien, Lanti konsilas *k*.

Neniel stranga estas la fakto, ke la tuta red. de L.P. pri tio samopinias. *K* estas ne nur ridiga maloftaĵo, sed pro manko de mallongiga punkto ne akceptebla. Kaj L.P. instruas la lingvon kia ĝi devas esti, ne kia iu ajn maloftulo ĝin deziras.

Cetere, en la uzado de la lingvo ni ne agnoskas aŭtoritatulojn, eĉ ne, se ili havas plej grandajn meritojn en la movado.

